

Esperanto sub la Suda Kruco

Numero 1 — Januaro-Februaro 1993



Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Esperanto-Asocioj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio. ☎ (09) 574 1307.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Manuskriptoj devas esti klare tajpitaj kun duobla spaco inter la linioj. Netajpitaj manuskriptoj estos malakceptitaj. Oni povas ankaŭ sendi kontribuojn sur 3½-colaj komputildiskoj Macintosh aŭ MS-DOS. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 26 februaro.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.

Kasisto: Owen Lonergan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Membrokotizoj: AUD\$25 por individuo, klubo, kc; \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso) \$15 (minimуме) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd., Auckland 7. ☎ (09) 817 8244.

Sekretario: Jo Knight, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 3. ☎ (09) 846 2601

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 3.

Membrokotizoj: NZ\$25 por individuo; \$35 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo po \$1 por ĉiu ano, maksimume \$15.

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas AUD\$40 (50 ned. gld.), kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Sendu pagon per internacia bankĉeko al la kasisto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio aŭ al la UEA-konto de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kun samtempa atentigo al la Libroservo de AEA.

EN ĈI TIU NUMERO:

ARTIKOLOJ:

La Rakedo de Freddy Revenas (Trevor Steele)	3
Lingva Angulo (Alan Towsey).....	12
"This", "That", and "What Else" (Marcel Leereveld).....	13
Belartaj Konkursoj 1993.....	16
"Kiu Diris Tion?" Citajkvizo 9 (Ralph Harry).....	17
Rezolucio de la Germana Esperanto-Asocio.....	18
Deziras Korespondi.....	18
Retrokomete (René Smeets)	19

Rubriko de Odlo Bokserp.....	20
"Elfreĝo" (Goethe).....	21
Diversaĵoj.....	22
Korekto pro NZEA kaj Suda Kruco	24
Atentigoj.....	25
El la Regionoj.....	26
Raporto pri Radio 3ZZZ (Svetislav Kanački).....	27

LIBROJ:

<i>Memori kaj Forgesi</i>	8
<i>Fundamenta Krestomatio</i>	10
<i>La Gusto Plu Alta</i>	11

LA RAKEDO DE FREDDY REVENAS

DE TREVOR STEELE

Freddy aliris min kaj flustris el la buŝangulo: "Hej, Kent, ĉu ni povas paroli pli private?" Lia voĉo estis tiu de komplotanto, kaj min honoris, ke li alparolas min.

"Certe," mi respondis, iom pli leĝere, sed mi tre volonte sekvis lin, kiam li, kun la manoj en la pantalon-poŝoj, transiris la lernejan korton kaj ne atentis la geknabojn, kiuj brue kuradis aŭ babiladis tie. De tempo al tempo li malrapide rigardis trans la ŝultron por esti certa, ke neniuj observas nin. Ankoraŭ mi rifuzis marŝi kvazaŭ spiono.

Ni preteriris la ludkampon kaj trovis izolitan lokon malantaŭ riverborda arbo. Ĉiuj sciis, ke estas severe malpermesite iri ĝis la rivero mem, sed ni lertis iri ĝis la ekstrema punkto, kie ni ankoraŭ ne faris specifan punendadon. Iel tio aldonis al la komplotetoso, kiun Freddy tre amis.

Per preskaŭ fermitaj okuloj li ĵetis ankoraŭ unu rigardon malantaŭen, kaj iom laŭtigis la voĉon: "Ili diris al mi, ke via Paĉjo havas amason da .303-aj kugloj el la Milito. Ĉu prave?"

Tuj mi konsciis, ke Freddy incas min en unu el siaj eksperimentoj, kaj tio min ege kontentigis. Neniam antaŭe li konfidencis planon al mi, kaj la perspektivo estis tre ekscita. Iam li prunteprenis botelon da metilalkoholo de Sean O'Leary, kaj aliffoje li akiris puran alkoholon de Terry Baker, la filo de la farmaciisto. Dum semajnoj Sean kaj Terry elŝovadis la bruston kaj fanfaronis pri sia reputacio de kamaradoj kaj kunkomplotantoj de Freddy. Kompreneble ankaŭ mi pretis fari ion

ajn por akiri tian rolon, sed mi decidis ludi la varbendulon.

"Eble jes, eble ne," mi respondis. "Kial vi volas .303-ajn? Ĉu vi havas .303-fusilon? Mia Paĉjo diris, ke ili estas terure danĝeraj, Freddy, ili mortigis milionojn da homoj en la Milito."

"Pravas do. Li ja havas ilin."

"Mi diris, ke eble."

Freddy komprenis, ke li devas inici min pluen. "Vidu, Kent, mi ne volas la kuglojn mem. Mi forjetos la parton, kiu mortigas homojn."

Tion mi trovis nesufiĉe informa. "Mi ne povas prunti al vi la kuglojn de mia Paĉjo, se mi ne scias, kial vi volas havi ilin."

"Do finfine—li vere havas ilin! Kion mi volas, estas tio, kio estas en la kugloj. Oni nomas ĝin..." kaj lia voĉo iĝis preskaŭ neaŭdebla sed ege atentodeviga, "...kordito."

Mi metis la manojn en la poŝojn kaj diris tre leĝere, "Kordito." La vorto elvokis ion sciencan, misteran kaj alta-grade eksplodan, ĝuste ion nepran al unu el la eksperimentoj de Freddy. Mi tuj sciis, ke mi ŝtelos por li kelkajn el la kugloj de mia Paĉjo—finfine li aĉetis centojn da ili ege malmultekoste post la Milito—sed Freddy ne facilanime kalkulu je mia partopreno. Do mi ripetis, aldonante nuancon de enuo, "Kordito. Jes, mi scias ĉion pri kordito, mia Paĉjo klarigis al mi ĉion pri kordito." Me eksentis tamen embarasigon, ĉar mi havis nenian ideon, kion tiu mistera vorto signifas.

"Aŭskultu, Kent, mi bezonas korditon por fari rakedon. Mi...hm...pruntis iom de mia Paĉjo sed mi bezonas pli

Ni ĉiuj timis s-ron Miles, kaj forta antipatio ligis lin kaj Freddy. La aŭdaco de Freddy, pafi ŝtonon tra ties necesejan muron, plenigis almenaŭ ĉiun lernejanon per respekto kaj admiro. Neniu sciis solvi la misteron pri la sorto de tiu ŝtonĵetilo; kial ĝi malaperis? Laŭflustre s-ro Appley detruis ĝin pro tio, ke li ne volis iri en malliberejon pro la agoj de sia "merdkapa idaĉo". Konfesendas, ke, se Freddy estus farinta nenion alian, li tamen estus enirinta en la analojn de Kverka Valo.

Sed li faris pli, multe pli. Estis Freddy, kiu demonstris al almenaŭ dudek aŭ dudek du el ni knaboj sur riverbordo, kiel oni faras karbidbombon. Li fabrikis ĝin antaŭ niaj okuloj. En malplenan tomatosaŭco-botelon li ŝutis tasplenon da karbido. Li prenis tre maldikan karoton kaj traboris ĝin de supro ĝis subo. "Tra ĝi la akvo eniras," li klarigis, alte tenante la boritan legomon. Li ŝovis la karoton en la botelon, ĝis ĝi fiksiĝis, kaj diris, "Vi devas ĉiuj foriri de la bordo. Ĉi tiu povas eksplodi kun knalego." Ni murmuris nekredante—tio estis alia parto de la ludo, ni junaj mondumuloj kutime rolis kiel rikanpretaj skeptikuloj—sed ni jam moviĝis iom for de la riverbordo. Ĉiukaze ni sciis, ke Freddy rifuzos daŭrigi, se ni staros senmove.

Li kuŝigis la bombo-botelon sur la riversurfacon, kaj rapide eliris mem el la akvo. Kaj ne senkiale. Tre baldaŭ akvo likis en la botelon kaj tre ĝenis la karbidon. La botelo skue ekdancis, tiam saltege gimnastikis kaj kun furioza efervesko dispeciĝis. Ĝi penis brue eksplodi, sed la rivero plejparte sufokis la bruon.

Ni ĉiuj algapis la sennombrajn vitrofragmentojn, dum ili sinkis en cirklo iujn metrojn for de la ekirpunkto. Ni

staris neparolipovaj. Freddy aliflanke elokventis. Li fanfaronis, ke li jam ofte mortigis fiŝojn per tiu metodo, "dekojn da fojoj". Tio estis tro, ĉar nenie videblis mortigita fiŝo, sed evidente iu ajn eventuale preternaĝanta fiŝo estus ricevinta malagrablan surprizon, kaj la demonstro estis tiel impona, ke ni ne kuraĝis nei la fanfaronadon.

Vere estas, ke unu fojon Freddy humilige malsukcesis. Ni estis ĉe unu el la rokbordaj riverkurboj kutime priloĝataj de nudaj knaboj. Ĉiam ni naĝis en la rivero. En tiu tempo domkorto estis lokoj por necesejoj, ĝardenoj, kriketejoj, ne por naĝejoj. Mi supozas, ke ĉiukaze neniuj civitano de Kverka Valo posedis sufiĉe da mono por konstruigi kortan naĝejon; kaj finfine kiu tiel frenezus havi kortan naĝejon, kiam nia rivero abundis je bonaj naĝlokoj? Ni loĝis en la ekstremnorda montaro de Kvinlando, tre bela kaj speciala parto de Aŭstralio.

Nu, jen ni, plonĝante kaj naĝante kaj ridante kaj fanfaronante kaj tiel plu, kompreneble nudaj, kiam Freddy aperis kun papero kaj lignaĵoj kaj alumetoj kaj iu tre forta likva brulaĵo. Li anoncis, ke li krevigos la plej grandan rokon, tiun, de kiu ni plej ofte plonĝis. Hore ni protestis, ke li ne tuŝu nian plej bonan rokon, kio malbone akordis kun la multaj mokkrioj, ke li ĉiukaze ne povas krevigi rokojn. Freddy do elektis malpli grandan rokon, en kiu ja estis fendolinio, kaj ekbruligis en la fendo fajron. Li lekciis pri ekspansioj kaj dilatiĝoj kaj dispremoj kaj aliaj sciencaj aferoj, kiuj rapide silentigis nin.

La fajro de Freddy jes ja brulegis, kaj ni ĉiuj restis je protekta distanco. Freddy terure ŝvelparolis, sed baldaŭ evidentiĝis, ke la fajro ne intencas

Mia familio transloĝiĝis el Kverka Valo la postan jaron kaj mi neniam reiris al la vilaĝo, fakte mi ne vizitis Kvinslandon en la longa intertempo. Sed de tempo al tempo mi demandas min, kio Freddy iĝis en la vivo.

Ĉu li estas nun sciencisto, kiu konstruas nukleajn bombojn? Ne, neniam li estus sukcesinta fari la neprajn ekzamenojn.

Mi supozas, ke li heredis la aŭtoriparejon de sia patro.

Se jes, sendube liaj klientoj spertas de tempo al tempo neatenditajn eksplodetojn.

[Noto: Trevor Steele informas ke la ĉi-supra rakonto laŭintence devus esti unu el la noveloj en lia nova libro *Memori kaj Forgesi* (ĉisube recenzita).] □

m

MEMORI KAJ FORGESI

RECENZAS DONALD BROADRIBB

Memori kaj Forgesi de Trevor Steele. Vieno: Pro Esperanto, 1992. 143p., broŝ. \$32 de la AEA Libro servo. Havebla en februaro.

Originala literaturo en Esperanto malofte estas escepte bona. Verŝajne ĉar la plej bonaj aŭtoroj preferas eldonigi siajn verkojn en nacia lingvo, kie ili povos ne nur konatiĝi sed ankaŭ espereble ricevi iom da mono pro la vendoj. Eldonejoj en Esperanto preskaŭ senescepte postulas ke la aŭtoro mem pagu la plejparton de la eldonkostoj, tiel ke por vidi sian verkon en eldonita formo la aŭtoro devas rezigni pri la ajn honorario aŭ eĉ ricevo de la monsumo elpagita. En la angla lingvo tiajn eldonejojn oni nomas "vanity presses" kaj ili estas neoftaj. En Esperanto ili estas la regulo, tiom ke eĉ ne ekzistas esperanta vorto por distingi ilin disde honoraridonaj eldonejoj.

Negrave kia ajn estas la kaŭzo, altkvalita literaturo originala en Esperanto estas tre rara—eĉ kvankam la kvanto da originala literaturo estas tre granda. La kvanto da vere altkvalitaj literaturaj verkoj preskaŭ estas nombr-

ebla per la fingroj de unu mano, aŭ eble du manoj. Da profesinivelaj fikciverkistoj en Esperanto dum la pasintaj kvindek jaroj eble oni povus nomi nur duon, Stellan Engholm kaj Ferenc Szilágyi.

Nun tamen sekvas la vojon parte montritan de tiuj du granduloj nia aŭstralia Trevor Steele. Lia romano *Sed Nur Fragmento* (1987) aŭguris altkvalitan literaturan karieron por li. Nun lia *Memori kaj Forgesi*, kies subtitolo estas "Noveloj el la Norda Montaro", reemfazas tiun aŭguron. Kaj—kvazaŭ miraklo en Esperantio!—li eĉ ne devis pagi la eldonkostojn, sed ricevos tantiemeton.

Temas pri kvin noveloj. En ĉiuj la scenejo estas norda Kvinslando. Plej impona estas la titolnovelo, "Memori kaj forgesi", 16-paĝa proza tragedio pri juna knabo 9-10jara kies amiko estas similaĝa aborigena knabo, en vilaĝeta socio kiu ne toleras tian amikecon. Feliĉan kulminon ne atendu. Kvankam la epoko estas la 1950oj, la socia sinteno en Aŭstralio ĉirilate ne multe ŝanĝiĝis ĝis nun.

Interesa konstato, ĉu akcidenta aŭ

intencita?, estas ke la ennovela rivero de "forgesi kaj memori" tamen donis inversan vortordon al la titolo de la rakonto kaj de la libro, "memori kaj forgesi".¹

Sekvas "Aminduma vespero", kvinpaĝa kronologio de eventoj dum esume 1 horo kaj 20 minutoj, kiu ne tre nostalgiigas pri la pasinta epoko de senkulpeco. La aŭtoro informis min ke efektive ĉi tiu noveleto estis "ŝerco" kaj ne intencita por la libro, sed la eldonisto insistis enmeti ĝin. Tiurilate, mi opinias ke la eldonisto tute pravis.

"Mia kara Rita" estas 24-paĝa serio da 11 "amleteroj", kies scenejo denove estas vilaĝeto, ĉifoje Monto Eliza. Sukcesa, iom amuza, iomete senesperiga, bildo de aŭstralia vilaĝeta vivo, denove en la 1950oj. Verkis la leterojn juna instruisto dum iomete malpli ol kvar monatoj. Kvankam ne atinganta la profundecon de la titolnovelo, ĉi tiu nostalgia verketo rajtas fierigi sian aŭtoron.

"Heroo de nia epoko" estas tre ali-eca peco da aŭstraliologio. Ĝia akuta krudeco rilate al parolado kaj al sin-esprimado de la "heroo" (sed ne nur de li) eble pravigeble ŝokos iujn legantojn. La "socia realismo" de ĉi tiu novelo estas palpeble malsimila al tiu de la antaŭaj, kvankam ne malpli vera kaj "reala". Ĝi foje pensigas min pri la skolo de tragediistoj kiaj Eugene O'Neill, Arthur Miller, Tennessee Williams, aŭ, pli trafe, John Steinbeck; kaj

efektive, la "rakontanto" en la novelo estas mem "plejparte idioto" (noto sendita al mi de la aŭtoro). Se tiel, do tre pensiga idioto! Nu, ĉi tiu novelo montras verktalenton kiu severe disciplinite povos prave renomigi la aŭtoron.

Lasta estas "Savo de nigra animo", 42-paĝa tragedieca verko en kiu la socia realismo egale forte, kvankam iom pli mildanime, ĉefrolas. Denove la "aborigena problemo" kaj la sinteno de "blankaj" aŭstralianoj rilate la "nigrajn" (pli precize, "nigajn", malestima fiformo de la vorto "negrojn", angle "niggers"), kaj iomete inverse, estas sub la lupeo. Ĉu tiom da "malpuraj tolaĵoj" ni devus montri al la mondo? Nu, ni sinfiere prezentas tiujn de Sudafriko, do ni ne rajtas por ĉiam kaŝi honestan prezenton de la vero aŭstralia.

Trevor Steele verkas pli koncize, do pli distre, en ĉi tiuj noveloj ol en la antaŭa romano. Eble la ĉefa diferenco estas la pli klara distingo inter la komplotfadenoj, en la noveloj—ĉu nur pro la relativa mallongeco de noveloj, aŭ pro ioma plimaturigo de lia verktalento? Ĉu eble pro ambaŭ? Negrave pro kiaajna kaŭzo, en Trevor Steele ni havas priferendan literaturiston. □

ĈU VIA ADRESO ESTAS ĜUSTE PRESITA SUR LA MALANTAŬA KOVRILO?

Pro neceso utiligi novan adresprogramon, povas esti ke kelkaj adresoj estis miskopiitaj. Bonvolu informi la redaktoron se eraro okazis viarilate.

¹Leginte presprovajon de ĉi tiu recenzo, Trevor Steele informis min ke la inversigo de la vortordo en la titolo estis (laŭ mi: serendipa) eraro de la eldoninto. Por kompreni la signifon de tio, necesas legi la novelon kaj efektive la tutan libron.

FK

FUNDAMENTA KRESTOMATIO

RECENZAS DONALD BROADRIBB

Fundamenta Krestomatio, redaktita de L.L. Zamenhof, 18a eldono, prinotita de Gaston Waringhien. Rotterdam: UEA 1992. 440p. \$41.50 de la AEA Libro servo.

Temas pri fotorepreso de la 17a eldono, aperigita de The Esperanto Publishing Company en Anglio, 1954, tiam prinotita de W.J. Downes.

Waringhien anstataŭigis la notojn de Downes per la propraj por ĉi tiu eldono fare de UEA. La preslitteroj estas iomete pligrandigitaj, kaj la notoj multe pli abundas.

La *Fundamenta Krestomatio* unue eldoniĝis en 1903. Ĝin publikigis Zamenhof kiel bazan antologion por servi kiel stilmodelo por esperantistoj, precipe verkantoj. Enestas diversaj ekzercoj (kiuj poste konsistigis parton de la *Fundamento de Esperanto*), fikciaj

verkoj (fabeloj, legendoj, anekdotoj, rakontoj), nefikcia parto ("El la vivo kaj sciencoj" inkl. oftalmologian verkon de Zamenhof mem), artikoloj pri Esperanto, kaj 140 paĝoj da poezio originala kaj tradukita.

Kvankam ne plu fidinda modelo de stilo kaj vortuzado, ĉar ĝi estas tro arkaika, la *Fundamenta Krestomatio* konservas sian valoron por personoj dezirantaj koni la fruan literaturon de Esperanto.

La prilingvaj notoj de Waringhien estas, miaopinie, grandparte vere pedantegaj, kaj multaj estas tre subjektivaj. Sed sendube ne ĉiuj legantoj akordos kun mi.

La du verkoj *Fundamenta Krestomatio* kaj *Nova Esperanta Krestomatio* estas binditaj por esti ĝemeloj sur la librobreto.

G

LA GUSTO PLI ALTA

RECENZAS DONALD BROADRIBB

La Gusto Pli Alta, tr. Rŝi Kumāra dāsa. Privata eldono, 1992. 156 grandformataj paĝoj. Ilustrita. Plaste bindita. Prezo: \$20. Mendu de Bob Felby, 6 Dorset Street, Semaphore Park Sud-aŭstralio 5019.

Ĉi tiu libro havas du partojn. La dua parto estas kuirlibro, kun ĉ. 80 receptoj por vegetaraj manĝaĵoj. La unua parto detalumas la kialon de vegetarismo, kaj la filozofi-religian bazon de

vegetarismo laŭ la Movado Kriŝno-Konscio.

La (nenomita) aŭtoro emfazas ke oni ne provu la receptojn antaŭ ol tralegi la enkondukajn ĉapitrojn. Ĉar ja temas pri religia libro, tio ne mirigas. Ekzistas ritaj devoj konektitaj kun la preparado kaj manĝado de vegetaraj aĵoj, laŭ la Kriŝna-Konscia Movado.

Kvankam mi estas nek vegetarano nek religiulo, mi trovis la enkonduk-

ajn ĉapitrojn tre legindaj. Mi ofte demandis al mi kial vegetaranoj rifuzas manĝi viandon surbaze de rifuzo mortigi bestojn, sed akceptas manĝi plantojn kiuj tamen estas egale vivantaj estaĵoj. Tiu temo estas diskutita en ĉi tiu libro, kaj la respondo eble surprizos vin, kiel jam estis surprizita mi.

La enkondukaj ĉapitroj komprenigas iom pri la Kriŝno-Konscia Religia Movado (ĝi ne mem estas nova religio, sed la origina radiko de la Hindua [Veda] Kulturo). Se mi ne craras, ĉi tiu estas la unua grandskala verko esperantigita de kaj por tiu movado. La nemembroj emas iom moke nomi tiun movadon la "Hare-Kriŝna-istoj", sen konsidero ke temas pri religio kies anoj estas piaj membroj de la ĝenerala hinduisma tradicio kies radikoj estas multe pli antikvaj ol tiuj de la "okcidentaj" religioj. "Kriŝno" mem estas la nomo de Dio, laŭ la hinduisma tradicio.

Inter esperantistoj mi trovas la saman mankon de kompreno pri alies religio(j) kiel inter ne-esperantistoj.

Ŝajnas ke nia tutmondismo ne estas aplikata al interreligia kompreno, kun kelkaj honorindaj esceptoj. Ŝajnas ke malmultaj esperantistoj sentas sin sufiĉe sekuraj rilate siajn proprajn kredojn aŭ opiniojn, kaj tial ili aŭ rifuzas legi la vidpunktojn de aliaj, aŭ rifuzas serioze prikonsideri ilin. Por personoj kiuj tamen deziras karakteriziĝi kiel inter la "honorindaj esceptoj", mi rekomendas ĉi tiun libron.

Pri la receptoj mem mi povas malmulton diri, krom ke multaj el ili salivigas min. Ili pruvas almenaŭ ke vegetaraĵoj povas esti altkvalitaj majstrokuiraĵoj.

Notu ke la receptoj ne uzas ovojn, sed ili ja uzas lakton kaj laktajojn, ink. buteron. Pri la kialo, legu la enkondukajn ĉapitrojn. Farante tion, vi ankaŭ informiĝos pri la malvereco de la mito de la ruiniĝo de Hindio pro la "sanktaj bovinoj". Per tio forviŝiĝas unu el niaj metaforoj. Negrava perdo.

La libro estas tre modeste presita kaj bindita. Enestas tre malmultaj tajperaroj. Kaj la lingvaĵo estas tre bona. Legu, preparu, kaj ĝuu. □

BONVOLU KOREKTI

En nia lasta numero (N^o 276)

Sur paĝo 2: la nova nomo de nia gazeto estas *Esperanto sub la Suda "Kruco" anstataŭ "...Stelo"*. Ni petas pardonon pro iaj miskomprenoj kaŭzitaj de tio.

p.9, unua kolumno, linio 21, "temp-on" devas esti "temon";

p.14, kol 2, linio 25: "limita" estu "limigita";

p.15, kol.2, linio 11 "du" estu "dekdu"; linio 31 "nedifinitan artikolon" estu "nedifinita artikolo";

piednoto 2, post 1985 estu "p.180";

p.16, kol. 1, inter linioj 10-11 mankas

jena frazo: "Ĉu vere donas pli da signifo al la frazoj la anglaj vortoj ol la zozo-vortoj de Beaucaire?: talenta angla zozo; granda grupo—zozo—de deputitoj; faktoroj kiuj karakterizis la zozajn zozojn."

p.17, linio 21, komence kun la vorto "citi" estu: "citi fremdlingvajn frapantajn formulaĵojn, ĉar famaj aŭtoroj de la pasinteco tiel faris kaj ĉar etnolingvaj vortaroj registras la plej oftajn alilingvajn citaĵojn.";

piednoto 1, "*Latinamerika Memuaro*" estu "*Debrecena Bulteno*";

piednoto 2: "50:3..." estu "5, januaro-aprilo 1989, p.3". □

Zamenhof) en adverba formo: "ke ŝi lin helpis, estas laŭdinde". (Komparu: "Estas konsilinde ekmalludi nun").

Kiam la adjekto en ĉefpropozicio estas subpropozicio prepozitiva (ekz. **I agree with that he is right*—**Mi samopinias pri ke li pravus*), oni en la angla kaj en Esperanto aŭ ellasas la prepozicion (ŝanĝante tiel la subpropozicion en akuzativon, sed tamen adjektan): "*Mi samopinias, ke li pravus*" aŭ aldonas enkondukan vorton, ĝenerale "that" aŭ "this" aŭ "the fact": "*Mi atribuas la akcidenton al tio [al la fakto], ke...*". En la lasta kazo la subpropozicio fariĝas kvazaŭ suplemento determinanta tiun enkondukvorton. (Komparu ankaŭ: *I attribute the accident to fast driving*—"*Mi atribuas la akcidenton al *rapide aŭtomobili = rapida aŭtomobilado*"). Io simila, sed nun epiteta, okazas ĉe kelkaj aliaj substantivoj enhavantaj verban karakteron, ekz. "*la mencio, ke...*", "*lia diro, ke...*", "*onia deziro, ke oni restu sana*" (komparu: "*Onia deziro resti sana*"). Kvankam laŭpozicie tiaj subpropozicioj aspektas adjektivaj, laŭfunkcie (ĉar ili estas adjektoj de la verbsenco en la substantivo aŭ de la verbo en la ĉefpropozicio) kaj laŭforme (ĉar ili komenciĝas per la subjunkcio "ke") ili aperas prepozitivaj (aŭ subjektaj, aŭ objektaj). Pli adjektivecaj ili aperas en frazoj kiaj "*Oni prognozas tian veteron (veteron tian), ke mi surmetos pluvsurtuton*"—*They forecast such weather that...* (komparu: "*Oni prognozas tian veteron, kian (= rilata adjektivo) ni malofte spertis (= ...as we seldom...)*).

Grava problemo pri "ke" montriĝas nur kiam la angla lingvo "forĝegas" uzi la subjunkcion "that"; tiam angla-lingvanoj facile forĝegas ankaŭ "ke": "*Don't forget he is your brother*—"*Ne forgesu, ke li estas cia frato*"; *We told him*

we would not be able to come—"*Ni al li diris, ke ni ne povos veni*", ktp. Ĉar en la angla ni nekonscie ellasas "ke", ni aŭtomate faras tion en Esperanto, malĝuste. Ni daŭre devas pensi pri tio, kiam ni parolas, sed ofte eĉ ne konscias ke temas pri du propozicioj, do ke bezoniĝas komo kaj enkondukvorto, ofte "ke". Tio speciale erarigas nin en kazoj kiaj *I know him to be capable* = "*Mi scias, ke li estas kapabla*"; *I ordered the letters to be written* = "*Mi ordonis, ke la leteroj estu skribotaj*"; kaj *I expect him to give it back* = "*Mi supozegas, ke li redonos ĝin*" ("*Mi supozegas lin redoni ĝin*" = *I expect to give* [= rekta objekto ĉe "supozegas"], = *that I shall give, it back to him* ("lin" < "al li"). Krom tiu forĝeso ne ekzistas en la angla aliaj alternativoj por la subjunkcia funkcio de "that", eĉ ne "this" aŭ "what".

Montra pronomo

La dua funkcio de "that", tiu de montra pronomo, ankaŭ ne donas malfacilaĵojn, almenaŭ se ĝi uzatas en frazo simpla, t.e. sen subpropozicioj. Ĝi estas "tio"; kun "ĉi tio" (aŭ "tio ĉi") por ĝia frateto "this". Ĝi povas esti subjekto: "*Tio (ĉi) plezurigos lin*"; rekta objekto: "*Oni (ĉi) tion tre ŝatas*"; predikativo: "*Mia elekto estas tio*" (sed *That's that* = "*Tio estas farita, finita, ktp.*"); prepozitivo: "*Oni ne povas batali kontraŭ tio*".

Malfacilaĵoj aperas, kiam la montra pronomo "that" estas la determinato (= ĉi tie "*antecedento") de rilata (adjektiva) subpropozicio: *That (= subjekto) which (= subjekto) falls may break*—"*Tio, kio falas, povas rompiĝi*". Notu ke ĉi tie "that" estas subjekto de la ĉefpropozicio kaj "which" estas subjekto de la subpropozicio. Ĉiaj kombinaĵoj de la diversaj frazfuncioj de "that" kaj "which" povas okazi, eĉ pre-

pozitivaj: *"Ne paŝu sur tion, per kio la birdo faras sian neston"*. La unua problemeto do estas ekscii, kiujn funkciojn "that" kaj "which" havas en siaj respektivaj frazoj, speciale ĉu nominativo aŭ akuzativo; ne ĉiam facile. La dua problemeto okazas, kiam la pozicioj de la du estas disigitaj, ekzemple en *Which (What) you are learning by heart, that is a lot*—*"Kion ĉi lernas parkere, tio estas multe"* kaj *That is a relief, which he has just said*—*"Tio estas trankviligo, kion li ĵus diris"*. Tiaj frazoj, ne "oficialaj" en la angla, estas evitindaj ankaŭ en Esperanto. La granda problemo aperas, kiam en la angla oni kombinas la du vortojn "that" kaj "which" en unu vorton "what"; oni povas ree havi ĉiajn kombinaĵojn: *Don't step on what the bird makes its nest with*. En Esperanto oni ne povas esti tiom libera: kombino eblas nur, se ili ne estas prepozitivoj kaj se ambaŭ estas en la sama kazo (nominativo aŭ akuzativo); la kombinivorto tiam estas "kio(n)". Do eblas *"Kion ĉi trovis, mi redonus"* kaj *"Ĝi estas neriparebla, kio rompiĝis"*.

La nura "kio" eblas ankaŭ, se ambaŭ vortoj havas la saman prepozicion: *"Mi ne kapablas labori, per kio mia frato tiom grande sukcesas"*. Ne eblas kombini en unu vorton "tion, kio" nek "tio, kion". Cetere "what" en kompleksa frazo estas ofte ne kombinaĵo de "that" kaj "which", sed "kaŝita" demanda pronomo: *I don't know what is in that box* = *"Mi ne scias, kio estas en tiu skatolo"* (ne "...tion, kio"). Anstataŭ "tio(n)" oni ĉiam rajtas uzi "ĉi tio(n)", ja temas pri montra pronomo.

Montra adjektivo

La tria signifo de "that" tute ne donas malfacilaĵojn al ni. Tiu estas la montra adjektivo, troviĝanta ĝenerale

(en Esperanto ne necese) antaŭ substantivo: *You should appreciate that gift*. La Esperanta vorto por tiu signifo estas "tiu(j)(n)": *"Ĉi devetas ŝati tiun donacadon"*.

Se antaŭe aŭ tuj poste menciita substantivo mankas, la montra adjektivo en Esperanto, "tiu", fariĝas memstara, kaj do montra persona pronomo. Ĉar ĉi lasta mankas en la angla lingvo, oni anstataŭe uzas "that person" aŭ ion tian, aŭ "those" por la pluralo, aŭ la (ĝenerale viran) personan pronomon de la tria persono: *He that (who) wants...* = *"Tiu, kiu deziras..."*, *Forget that person (aŭ the one) that (who)...* = *"Forgesu tiun, kiu..."*. En ĉiuj kazoj la montra adjektivo kaj persona pronomo povas ĉehavi "ĉi", kaj la montra persona pronomo povas ellasati en la samaj kazoj kiel la montra pronomo "tio", se determinata de rilata subpropozicio.

Rilata pronomo

La kvara funkcio de "that" estas la rilata pronomo, kiu komencas adjektivan, rilatan, subpropozicion kaj rilatigas ĝin al iu ajn substantivo aŭ pronomo (kelkfoje al infinitivo) en la ĉefpropozicio. La rilata pronomo kaj ĝia determinato en la ĉeffrazo havas ekzakte la samajn signifon kaj nombron, sed ne necese la saman kazon (= enfracan funkcion). En Esperanto ĝi estas (se ne "kio" ja rilatanta al "tio" aŭ al tuta frazo) "kiu", kaj oni ĉiam povas imagi post "kiu" en tiu signifo la de ĝi determinatan substantivon en la ĉefpropozicio: *"Mi renkontis la viron, kiu (viro) gajnis..."*. En la angla oni povas anstataŭ "that" uzi "who" por personoj kaj "which" por personoj kaj aferoj, kaj oni ankaŭ povas ellasi ĝin (nepre ne en Esperanto!): *The woman I went out with is...* = *"La virino, kun kiu*

mi diris amuziĝi, estas... ". Estas nefacile ĉiam pensi pri la ellaso de "that" (aŭ de "which" aŭ "who(m)") en la angla, kaj tial eraroj ekestas en Esperanto. Kiel jam menciite antaŭe, se la rilata pronomo determinas sanspecan montran pronomon, ili povas kunfandiĝi, en "who(m)" en la angla, en "kiu(n)" kun kazlimigoj en Esperanto. Se la rilata pronomo rilatas al tuta propozicio, ĝi en la angla estas nur "which" kaj troviĝas en ĉefrazo, mallogike. En

Esperanto ĝi tradukiĝas alimaniere: *He left the country, which we all regret = "Li forlasis la landon, kaj tion ni ĉiuj bedaŭras"*.

Adverbo de grado:

La kvina, lasta, funkcio de "that" estas tiu de adverbo de grado: *I'm not that stupid!* En Esperanto: *"Mi ne estas tiom stulta!"* kaj *As it got this close we were able to handfeed it = "Ĉar ĝi venis tiom proksimen, ni povis mannutri ĝin."* □

BELARTAJ KONKURSOJ 1993 UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Sep branĉoj atendas konkursaĵojn, kies kremon oni distingas per monpremioj.

La konkursaĵoj de ĉiuj branĉoj devas esti novaj kaj ne publikigitaj.

Poezio: Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200x65 tajpspacoj. Tri premioj.

Teatraĵo Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 78a UK: *Klerigo por la 21a jarcento*. Premio Luigi Minnaja.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio An-okin.

Fotografio: Teme ligita kun Esperanto aŭ la temo de la 78a UK (vidu supre). Tri premioj.

Vidbendo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistema VHS/PAL. Tri premioj.

ALSENDO: Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni devas sendi la

konkursaĵojn en kvar ekzempleroj kaj ili devas alveni plejlaste la 31an de marto 1993. Por fotografio kaj vidbendo oni sendu po unu ekzempleron antaŭ la 1a de julio 1993. La konkursaĵojn oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Oni povas havigi detalan regularon ankaŭ de tiu adreso.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. La konkursaĵoj (escepte vidbendojn kaj infanlibrojn) estu pseŭdonimaj. En aparta koverto estu enfermitaj la veraj nomo kaj adreso. Oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 370 gld. Dua premio: 259 gld. Tria premio: 148 gld. Luigi Minnaja kaj An-okin: 370 gld.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj. □

**KIU DIRIS
TION?**



**DE
RALPH HARRY**

Citajkvizo numero 9

Multaj eminentuloj parolis pri la beleco. Penu parigi la personon kun la citaĵo. La solvo aperas sur paĝo 27.

- | | |
|-------------------------|------------------------|
| (a) John Keats | (g) Charles Baudelaire |
| (b) Christopher Marlowe | (ĝ) Bertrand Russell |
| (c) Blaise Pascal | (h) Edgar Allen Poe |
| (ĉ) J.E. Flecker | (ĥ) Pablo Picasso |
| (d) Pierre de Ronsard | (i) Alexis Carrel |
| (e) Ŝekspiro | (j) Stendhal |
| (f) Leo Tolstoy | (ĵ) Max Beerbohm |

- Ĉiukaze, kio estas la beleco? Ne estas io tia.
- Ni, kiuj per kantoj faras amuza vian pilgrimadon
Kaj ĵuras, ke la belo vivas kvankam mortas lilioj...
- Estas mirige kiel kompleta estas la iluzio
ke la belo estas la bono.
- Matematiko, korekte rigardata, posedas ne nur veron sed superregan belon.
- Tie ĉio estas nur ordo kaj belo
Lukso, trankvilo kaj volupto.
- Objekto bela estas ĝoj' eterna.
- Ronsard min gloris iam, kiam mi estis bela.
- La beleco estas fonto neelĉerpebla por tiuj, kiuj scias kiel ĝin eltrovi.
- La beleco estas promeso de feliĉo.
- Pli ravas vi ol la aer' vespera
Kiun la belo de mil steloj vestas.
- La nazo de Kleopatra: se ĝi estus estinta pli mallonga, la tuta aspekto
de la tero estus ŝanĝiginta.
- Ĉu mi komparu vin al tag' somera
Vi estas ja pli bela kaj serena.
- La beleco kaj la avido al lernado estas ankoraŭ ne aliancigitaj.
- Helena, belo benas ĉar
Similas ŝipon el Nice'
Nomadon lacan sur la mar'
Portantan kvazaŭ sur ole'.

REZOLUCIO DE GERMANA ESPERANTO-ASOCIO okaze de la kontraŭeksterlandanaj atakoj dum la lastaj monatoj en Germanio

Germana Esperanto-Asocio kun hororo vidas, ke ŝovinismo kaj rasismo en blinde furioza malamo disvastiĝas pli kaj pli en Germanio kaj endanĝerigas nian demokration. Kiu hodiaŭ silente rigardas, kiam oni batas fremdulojn, morgaŭ devos rigardi, kiel oni bruligas librojn kaj kiel postmorgaŭ oni murdos tutajn grupojn el la popolo. La pretendo, ke Germanio "ne estas lando malamika al eksterlandanoj", fariĝas nuda cimiko.

Germana Esperanto-Asocio tial postulas:

- efikan protekton kontraŭ atakoj al korpo kaj vivo de homoj, kaj energian agadon de polico kaj justico kontraŭ la obstinaj perfortuloj;
- ampleksan dialogon inter socio kaj politiko sur ĉiuj niveloj, por venki la estiĝintan fremdiĝon kaj por serĉi even-

tualajn solvojn por la realaj problemoj kun konsidero de ties kaŭzoj;

- solidaran kaj aktivan pledon de ĉiuj demokratoj en "reto da solidareco" kontraŭ la terorismo de la politikaj dekstruloj, per tio ke pli ol ĝis nun ni faru la valorojn de demokratio, libero kaj homaj rajtoj bazo de nia identigo kun nia respubliko, tiamaniere malfortigante la naciisman elementon. Kiu nomas sin germano, devas aktive pledi por tiuj valoroj, pri kiuj ni devus fieri de 40 jaroj. Al niaj samlandanoj kaj al niaj amikoj en la tuta mondo ni diras: Tion ĉi ni ne toleras! Ne eblas senkulpigi tiajn fiagojn. Ni apelacias al niaj membroj kaj al ĉiuj Esperanto-amikoj, ke ili kun ankoraŭ pli da civila kuraĝo ol ĝis nun aktivu por la protekto de homoj senkulpe minacataj. □



Dezirataj Korespondi



Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originalajn leterojn de la ĉisubaj korespondemuloj oni povas havigi ĉe tiu adreso.

✍ Ruddy Fernández, Esperanto-Klubo, Gaveta Postal 2, Santiago de la Vegas, 17200 Ciudad Habana, Kubo. Samideanoj skribos pri multaj temoj.

✍ František Buček, Myslivcova 294, 72100 Ostrava-Svinov, Ĉeĥoslovakio. 51-jara. Pri ĉiu temo.


✍ Azhar Javed, International Islamic University, Islamabad, Pakistano. 23-jara; lernas Esperanton jam de tri jaroj; deziras internacian pacon.

✍ Valera Pont-3 des Troubadours, 84000 Avignon, Francio. Ŝatas marŝojn, muzikon, lingvojn.

✍ Helmi Haapsaaki, Mäntryinne 1A6, 55800 Imatra, Finnlando. 54-jara.

✍ Dorothy González Graw, Ave Camilo Cienfues 357, Contramaeste 92100 ST60, Kubo. Laboras en publika biblioteko.

✍ Laguanan B.P 20, 29500 Ergue-Gaberic, Francio. Pri diversaj temoj.



Retrokomente



DE RENÉ SMEETS

Kun intereso kaj surprizo mi legis la artikolon pri la deksepa regulo, de Bernard Golden. Vere, legado de la artikolo lasis min tre konfuzita. Mi demandis al mi ĉu la verkinto estas serioza, ĉu li ŝercas, blufas, blagas, aŭ—se vi volas alian anglismon—ĉu li “tiras mian kruron” kaj la krurojn de multaj legantoj. Eĉ mi telefonis al samideanoj por diskuti la 17-an regulon kaj solvi la problemon ĉu Bernard Golden ŝercas aŭ ne. Mi ne povis elpremi definitivan respondon. Dubo postrestas.

Do mi decidis trakti la aferon serioze.

Gaston Waringhien pravas kiam li diras ke la afero ne tro gravas, estas ja normale ke fremdaj vortoj trovas sian vojon en aliajn lingvojn, ofte eĉ pliriĉigante la ricevantan lingvon. Ofte kun la tempo la vorto alprenas novan lingvan karakteron, signifon, skribon kaj ne plu montras ian ajn similecon kun la originalo. Estas malfacile konjekti la germanan originon en francaj vortoj kiel *Guillaume*, *gage*, *maçons*, ktp. La pli grandaj, aŭ la plej granda ekonomia forto, vole nevole, enirigas vortojn kaj ideojn en aliajn kulturojn. Ankaŭ Esperanto suferas tiun influon. Tamen civilizacioj naskiĝas kaj mortas. Post la disfalo de la Romia Imperio, proksimume en la jaro 500, la latina lingvo daŭre vivis en la monaĥejoj kaj poste estis la “Esperanto” de la eŭropaj intelektuloj ĝis en la 18-a kaj eĉ 19-a jarcentoj. Poste la franca lingvo, ofte la lingvo de la aristokratio, superis. Nun

precipe ekde la dua mondmilito la angla lingvo estas la lingvo de la internacia komerco kaj eniris mondscale la komputilojn, kaj certe tenos unuarangan pozicion ĝis en fora estonteco.

Do certan influon mi ja toleras tamen mi protestas kontraŭ la deksepa regulo kiu vortas jene:

Se oni ne povas esprimi koncepton per elementoj de la esperanta vortprovizo oni diru aŭ skribu ĝin en la angla lingvo.

Mi kontraŭas tiun regulon pro la sekvaj motivoj:

- Akceptante anglajn vortojn oficiale, ni fordonas nian lingvan neŭtral-econ privilegiante la anglan lingvon.
- Ni malvere atestas superecon de la angla lingvo, konfesante ke certajn konceptojn oni pli bone angle esprimas.
- Ni enkondukas fremdan elementon kiu ne glate asimiliĝas. “Vikendo, mitingo, marketingo”. Vel
- La deksepa regulo maljustumas la ne angle parolantajn esperantistojn.
- Kvankam mi toleras la influon de alia lingvo, oficialigi tion jete malfermus la pordojn al lavango de anglismoj.

Bernard Golden defias la legantojn esperantigi kvin anglaĵojn: *Thriller*, *5 o'clock*, ktp. Kompreneble estas facile traduki tiujn esprimojn esperante, t.e. en la limigoj de la ebleco.

Traduki—mi ne pensas pri teknika vorto sed pri literaturo—estas ĉiam alproksimiĝi kiom eble al la originalo.

Vortoj estas simboloj kaj simboloj havas alian signifon por unuj ol por aliaj. La kruco aŭ la martelo kaj falĉilo produktas alian reagon en diversaj rondoj. La vorto "pomo" alvokas por anglo bildon de knabino, mi kredas, kun rozaj vangoj (dependas ankaŭ de la pomo), franco pensas pri bona cidro, alilandano pensas prefere pri la valoro de pomoj aŭ pri malsata stomako. Mi nur volas diri ke oni nur tradukas laŭ la ĉirkaŭteksto.

Konsiderinte ĉion, Samideano Golden, mi kredas ke vi ŝercas.

Ke la Akademio protektu nin kontraŭ la deksepa regulo!

[Noto de la redaktoro: jen la ĉimonata rikolto de anglajoj trovitaj—"dezajno" (design) en *Kontakto* 1992:3; "likideco" (liquidity [financa termino]) en *Sennaciulo* oktobro 1992; "medio(j)" (mass media) pluraj gazetoj; "lobio" (lobby group) *tejo tutmonde* oktobro 1992.] □



Retrokomente



DE ODLO BOKSERP



En *La Aŭstralia Esperantisto* N^o 276, paĝo 17, kolumno 2, linio 28, mi enmetis la vortajon *Rajtan'*, kontraŭ la malpermeso de nia kara Reaktoro, kaj bone konsciante ke mi riskas ke 17 milionoj da aŭstralianoj (jes ja! 17 milionoj!) procesos kontraŭ mi kaj ke la Alta Tribunallo devigos min pagi po \$1 por ĉiu ofendita aŭstraliano, t.e. \$17,000,000 (aŭ \$17.000.000 se vi legas eŭrope) entute. Mi certigis al nia Reaktoro ke la AEA sendube pagos tiun sumon, se la Alta Tribunallo rifuzos senkulpiĝi min. Tiucele la komputilo uzata por komposti nian gazeton estas asekurita, ĉu ne?

Leganto de nia gazeto (mi ne rajtas nomi ŝin, sed ŝi estas kapabla instruisto kaj verkisto kies dramo pri La Diluvo aperis septembre 1992 sur niaj prestiĝaj paĝoj) protestis ke ĉar mi:

skribis *Rajtan'* "Odlo sin montras Usonano; Aŭstraliano dirus *Rajton*".

Nu, kia fiakuzaĉo! Mi protestas apclacie al nia Majstro Zamenhof mem, kaj al ĉiuj koboldoj Esperantistaj, ke ili defendu min. Ke la akuzo estas prava tute ne gravas. Ĉu Zamenhof mem ja ne diris ke "La Fundamento de Odlo Bokserp devas esti netuŝebla eĉ kun ĉiuj siaj eraroj!"? Ĉu ne?—Ne? Nu, sendube li dirus tion se li pripensus la aferon pli zorge.

Nu, mi diras al mi mem: "Gudanĵa', Odlo!"

DB

¹Ĉi tiu vorto estas © 1993 Odlo Bokserp. <"Good on Ya", eleganta, formala aŭstraliana esprimo.

ELFREĜO
de J. W. VON GOETHE
TRADUKIS VILHELMO ALDRIDGE

Kiu rajdas malfrue
 Estas la patro
 Li gardas la knabon
 Tenas lin firme,
 tra nokto kaj vento?
 kun sia fileto
 en sia brako,
 konservas lin varma.

Mia filo, ĉu time
 Ho patro, ĉu vi
 La elfan reĝon
 Mia filo, nur estas
 la kapon vi kaŝas?
 la elf-reĝon ne vidas?
 kun krono kaj vosto?
 nebula striaĵo.

"Ho kara infano,
 "Ludojn bonegajn
 "Brilaj florarboj
 "Kaj robojn el oro
 nun venu kun mi!
 mi ludos kun vi;
 abundas ĉe-mare,
 portas la damoj".

Patro, mia patro!
 Kion Elfreĝo
 Trankvilu,
 En sekaj folioj
 Ho, ĉu vi ne aŭdas
 murmure promesas?
 restu trankvila, infano!
 flustras la vento.

"Ĉu, bela knabo,
 "Miaj filinoj
 "Miaj filinoj
 "Kaj ondos kaj dancos
 vi venos kun mi?
 ja zorgos pri vi;
 regaloj vin nokte,
 kaj kantos laŭplaĉe".

Patro, mia patro!
 En la mallumo
 Ho filo, mia filo!
 Salikoj antikvaj
 Ho, ĉu vi ne vidas?
 elf-inoj kaŝiĝas.
 Mi vidas precize:
 aspektas grizaj.

"Mi amas vin,
 "Kaj se vi malvolos,
 Ho patro, ho patro!
 Elfreĝo atakis min,
 plaĉas al mi via formo,
 mi uzos perforton."
 Li vokas min foren;
 faris doloron.

La patro ektimas,
 Li tenas la knabon
 Kun peno kaj zorgo
 En liaj manoj
 li rajdas rapide;
 ĝemantan enbrake,
 la korton atingas.
 la knabo malvivas. □



DIVERSAĴOJ



• **20 gravedaj esperantistinoj serĉataj por scienca esploro:** Efektive temas pri serioza studo de la lingva evoluo de infanoj kiuj de la naskomomento estas alparolataj en Esperanto de almenaŭ unu el siaj gepatroj. La studon faras konata Esperantisto, Renato Corsetti. La beboj prefere estu ankoraŭ naskotaj, por ke li havu sufiĉan tempon por sendi la necesajn informojn al la gepatroj antaŭ la nasko. ✉ Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00036 Palestrina, Italio. [Laŭ informo en *Venezuela Stelo* oktobro 1992.]

• **La gazeto *Monda Forumo*** devas aldoniĝi al la aŭstralia listo de periodaĵoj mendeblaj per la Libroservo de AEA. Abono por 1993 (kvar numeroj) kostas \$A28. Por esti subtenanto de *Monda Kunagado*, la kotizo estas \$A56, ankaŭ pagebla al la Libroservo de AEA. Provnumero de *Monda Forumo* estas havebla ĉe *Monda Kunagado*, Kūstriner Str. 3, D-O-1092 Berlin, Germanio.

• **Du broŝuretoj pri la regiono Trenta en Italio** estas eldonitaj de la Trenta turista informejo. Ili estas senpage haveblaj de APT—Azienda Di Promozione Turistica Del Trentino, Via Sighele 3, I-38100 Trento, Italio.

• **La nomo de "Eks-Sovetio":** Post longa konfuzo, ŝajnas ke la esperantista gazetaro decidis esperantigi la nomon de la ligo de eks-sovetiaj respublikoj KŜŜ = Komunumo de Sendependaj [aŭ: Suverenaj] Ŝtatoj, en la angla lingvo CIS. Via redaktoro rimarkis tion legante aron da "eks-sovetiaj" kaj aliaj esperantaj gazetoj dum la pasintaj

kelkaj monatoj.

• **Studvojaĝo al Tunizio:** TEJO ofertas studvojaĝon al Tunizio subvenciotan de la esperantista junularo franca 14-20 aprilo 1993. La temo: Mediteraneo—ĉu kultura kolizio aŭ integriĝo? Se vi povos kaj volos partopreni, bonvolu informiĝi kiel eble plej baldaŭ pri la detaloj ĉe: Aline Boulet, 43 avenue du Maine, F-75014 Paris, Francio.

• **Perkorespondan kurson pri librotenado/financa administrado serĉas Niĝeriano.** Li serĉas instruanton en anglalingva lando, por povi uzi anglalingvajn librojn. Ĝis nun li vane serĉis. Ĉu vi povas helpi? ✉ Evaristus Attah, PO Box 234, Nsukka, Enugu State, Niĝerio. [Laŭ *Eventoj* 0014, sept. 1992].

• **Bonvolu korekti en la Adresaro de AEA** sur paĝo 15, la antaŭlasta adreso devas esti *Sino Wynn Mackey*, 460 Dorans Road, Sandford TAS 7020, kaj relokigi sur p.12. Same pri la listiĝo p.17, *Sek/Kas Hobart Esperanto Group*. La administracio de AEA pardonpetas al Sino Mackey.

• **La Nepala Esperanto-Asocio** nun eldonas propran esperantlingvan bultenon, *Montejo*. Nin atingis numero 2, julio-septembro 1992. Adreso: *Montejo*, Nepala Esperanto-Asocio, PO Box 4098, Kathmandu, Nepalo. La abonprezo ne estas indikita. La interesa enhavo de la bulteno 8-paĝa ĉefe celas konigi Nepalon al eksterlanduloj.

• **Vegetarana Gazeto:** "Dum mi estis en Vieno, oni donis al mi ekzemplerojn de la *Esperantista Vegetarano* de la pas-

intaj du jaroj por disdoni al aŭstraliaj vegetaranoj. Sed ĝis nun mi ne havas la nomojn de 10 taŭgaj personoj por la alsendo. Se vi devus havi ekzempleron, skribu tuj al mi". Margaret Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield NSW 2070. (Laŭ anonco en *Telo-peo* decembro 1992.)

• **Rok-Gazet' havas nur 150 abonantojn.** Ĉu bele presita, altkvalita gazeto kun multaj fotoj kaj glacea papero povas pluekzisti longe, kun tiel malgranda abonantaro? Nu, eldono de la venontaj kvar numeroj (= unu abono, kostanta \$A32) estas garantiita de la eduka Fonduso Carson en Kanado. Sŭlo, lingvo, kaj aspekto nuntempe preskaŭ perfektaj...enhavo sole pri (esperanta) rok'-muziko. Ne lasu ĝin morti.

• **Kelkaj neologismoj akceptindaj:** demo (demonstration tape), haŝio (chopsticks), popo (pop music), rok' (rock music), ŝlagro (pop hit). (Ĉiuj el la aktuala numero de *Rok-Gazet'*).

• **Subite trovita! La "Dua Mondo".** Ĉu mistifikis ankaŭ vin ke la moderna tero konas nur la "Unuan Mondon" ("evoluintaj landoj") kaj la "Trian Mondon" (malriĉegaj landoj)? Kie do estas la "Dua Mondo". Vian redaktoron trafis la respondo dum li pripensis iom strangan fenomenon en la esperanta gazetaro: ke ili konas la ekziston nur de Usono/Eŭropo, kaj Afriko/Azio, sed tute ne konas la ekziston de Aŭstralio kaj Nov-Zelando! Ni estas evidente la plene forgesita "Dua Mondo".

• **Internacia Paca Forsto** estas la nomo de entrepreno internacie instigi la plantadon de "arboj por paco". Informojn de IPF, PO Box 7, Stroud, Gloucestershire GL5 1JQ Britio.

• **Asistilo: Revuo de komparado de religioj** ĵus aperigis sian 11an numeron

(aŭtuno 1992) [norda hemisfero, komprenble!]. 32 A4-dimensiaj paĝoj, ilustrita, klare presita, modele redaktita, lingvaĵo neriproĉebla. Ĉi tiu estas senpartia revuo pri ĉiuj religioj (en kiu povas kunlabori ankaŭ nereliguloj), kies celo estas *kompreni* la enhavon kaj kialon de diversaj religiaj sistemoj kaj kredoj, kun speciala emfazo je sociologiaj, filozofiaj, kaj psikologiaj faktoroj. Ankaŭ detaloj pri religia persekutado estas detalumataj —iom simile al prireligia "Amnestio Internacia". Eĉ ĉi tiu numero elstaras longa (8 paĝa) artikolo pri Racia Taoismo. Mi mem (DB) nereligulo, sed historiisto de religioj, senrezerve pledas ke vere liberalpensantoj legu, pripensu, kaj kontribuu. Abono: 8 guldencoj (= AUD\$22.00). Kontakto: Christian Lavarena, Prestvannet St Hjerm D-120, N-9012 Tromsø, Norvegio.

Fuŝitaj kaj mankintaj ekzempleroj

Pro eraro de la presejo Snap, en kelkaj ekzempleroj de *La Aŭstralio Esperantisto* 276 (Nov.-Dec. 1992) mankis iuj paĝoj kaj duoble aperis aliaj. Se vi ricevis difektan ekzempleron, bonvolu peti perfektan anstataŭan ekzempleron, de Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102, Aŭstralio. (Cetere, tio validas pri ĉiu mispresita ekzemplero de *TAE/ESK*.)

Pro eraro en la adresprogramo uzata por printi la adreslipetojn, kelkaj adresoj mankis en la dissendo de *The Australian Esperantist* 275 kaj 276 (Sept.-Okt. kaj Nov.-Dec. 1992) kaj eble de iuj pli fruaj numeroj. Se vi ne ricevis tiujn numerojn, bonvolu peti ilin de Owen Loneragan (adreso supre). □

KOREKTO PRI NZEA KAJ SUDA KRUCO

Troviĝas pluraj eraroj en la adiaŭa artikolo de Redaktoro Jozefo Major en la fina *Nov-Zelanda Esperantisto (NZE)*, de decembro 1992. Prezidanto Brian Fox ne "proponis la ĉesigon" de *NZE* en la "jarkunveno" de 1992. Ne okazis "Estrarkunsido" de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa) dum tiu kongreso, kaj neniam okazis "sekretaj intrigoj". La Estraro ne povis informi iun pri "decido" kiu ankoraŭ ne ekzistis.

En la unua sesio de la Jarkunsido en 13 januaro, dum diskuto pri la Raporto de la Estraro, la anaro diskutis Sekcion 11 pri *NZE*. La Estraro menciis ke Jozefo tiam havas operacion pro kataraktoj en la okuloj kaj esprimis bondezirojn al li pri tio. Unu el la anoj de NZEA demandis ĉu la Estraro havas eventualan planon se Jozefo ne plu povos redakti *NZE*. La anoj de la Mastertona Klubo diris ke ilia klubo aliĝis al Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) por ricevi *The Australian Esperantist (TAE)* kiun ili alte taksas. Iu el la anaro proponis ke, pro la granda aĝo de Jozefo, la Estraro de NZEA tuj diskutu kun la Estraro de AEA la eblecon ke la anoj de NZEA ricevu *TAE* en la eventualaĵo ke Jozefo ne plu povos redakti *NZE*, kaj raportu al la dua sesio de la Jarkunsido.

Ni petis tion al Ray Ross, Sekretario de AEA. Li kaj Tom Elliott aranĝis kunvenon de la du Estraroj, kaj ili ankaŭ telefonis al D-ro Donald Broadribb, redaktoro de *TAE*, por demandi lian opinion. La aŭstralianoj afable konsentis helpi nin en tiu eventualaĵo, kaj eĉ proponis ke, se tio okazus, ili povus ŝanĝi la nomon de la

gazeto por respeguli ambaŭ landojn. La Estraro de NZEA plene raportis la diskuton al la dua sesio de la Jarkunsido de NZEA en 14 januaro. Ĉiuj esprimis siajn dankojn al niaj aŭstraliaj samideanoj.

Post reveno al Nov-Zelando Brian kaj Jackie Fox veturis tra Sud-Insulo kaj Nord-Insulo vizitante anojn de NZEA. Ili petis al kelkaj spertaj esperantistoj ĉu ili povus redakti por *NZE* en la eventualaĵo ke Jozefo ne plu povus redakti. Neniu el ili povus.

En la *NZE* de aprilo 1991 aperis: "Slovakaj ciganoj invadis la ĉeĥan parton de la lando kaj kaŭzis pligrandigon de krimo kaj perforto". La Estraro kredas ke tio estas rasisma deklaro. En la *NZE* de februaro 1992 aperis artikolo kun la titolo "Homoseksualismo". La Estraro kredas ke tio estas atako kontraŭ nova ano de la Estraro de NZEA. Tiu Estrarano verkis respondon al la atako sed Jozefo rifuzis aperi ĝin. Post plua korespondado li denove rifuzis aperi artikolon. Pro tio la Estraro mem unuanime direktis la Prezidanton de NZEA, ke li verku artikolon por respondi al la du citaĵoj de rasismo kaj bigotismo, kaj la Estraro postulis ke ĝi aperu en ilia oficiala organo, *Nov-Zelanda Esperantisto*. Ĝi finfine aperis en la *NZE* de julio 1992. Brian ne esprimis "sian privatan opinion" sed verkis la unuaniman deklaron de la Estraro.

En 30 aprilo 1992 Jozefo skribis al la Estraro, "Ĉu mi daŭrigos en 1993 mi ankoraŭ ne decidis sed mi informos vin post mia reveno [de Eŭropo] en novembro." La Estraro respondis, "Kiel vi scias tio ne donos al ni sufiĉan

tempon por trovi novan redaktoron por redakti la eldonon de januaro-februaro."

La Estraro diskutis pri *Nov-Zelanda Esperantisto* en sia junia Estrarkunsido laŭ kvar vidpunktoj: (1) la kosto de *NZE* por la nombro da paĝoj, (2) la malfacilaĵo trovi novan redaktoron, (3) la manko de artikoloj pri nia regiono, (4) la plendoj de anoj ke ili malofte trovas interesajn artikolojn. Post longa kaj ĝisfunda diskuto la Estraro decidis ke ni petu al Aŭstralia Esperanto-Asocio permeson por partopreni en ilia gazetservo, same kiel ni

partoprenas en ilia libroservo. En 21 junio 1992 ni skribis al Jozefo por informi lin, kaj al Ray Ross de AEA por peti al ili. Tio estas la dato de nia decido. Ni unue skribis al tiu du, kaj tiam informis la anaron de NZEA. En 26 junio 1992 Jozefo respondis, "Mi akceptas tiun ĉi decidon ... kaj en la lasta decembra numero kontribuos finan adiaŭon al la legantoj, citante mian aĝon por rezigno."

Brian Fox
Prezidanto

Jo Knight
Sekretariino
□

ATENTIGOJ

1. Rekonante la donaceman laboradon/verkadon de la Redaktoro de *TAE/ESK*, la membroj de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio kiuj ekspedas la gazeton al la orientaj ŝtatoj de Aŭstralio kaj al Nov-Zelando volonte rezignas je rekompenco de la diversaj elspezoj por rilataj servoj por liveri la eldonaĵojn.

2. Ekspliko pri la kotizoj, rilate al la gravaj kostoj de *ESK*, por helpi la diskutadon en la Ĝenerala Kunveno de AEA 1993:

- (a) Pri la baza koncesia kotizo por membreco en AEA: Se ni akceptas ke la KM pagas nur la koston de *ESK* sola (sen la kosto de la *Adresaro* aŭ subvenciado de aliaj eldonaĵoj kaj elspezoj), la baza kotizo devus esti \$22 (\$3.66x6 numeroj = \$21.96). Do mi rekomendas ke la kotizo de KM estu (almenaŭ) \$20 jare.
- (b) Pri la ordinara membrokotizo: ni kutime aldonu dek dolarojn al la KM-kotizo, do mi rekomendas ke la kotizo de ordinara membro estu \$30 jarc.
- (c) Pri la Grupo-kotizo: Po kvar ekzempleroj de ĉiu numero, por ses numeroj la kosto estas nuntempe \$88. (24x\$3.66=\$87.84.) Se AEA subvencias duonon de la kosto de ĉiu ekzemplero, t.e. \$11, la kotizo certe ne estu malpli ol \$10 por ses numeroj po unu ekzemplero. Do mi rekomendas tabelon por Grupo-kotizoj jene: \$10 por ses numeroj po unu ekzemplero, \$20 po du ekzempleroj, \$30 po tri ekzempleroj, \$40 po kvar ekzempleroj, ktp.
- (ĉ) Pri Familia Membreco: ni kutime aldonu \$5 al la M- kaj K-kotizoj.

Owen Loneragan
Kasisto de AEA



EL LA REGIONOJ

NOV-ZELANDA KONGRESEJO:

Inter indiĝenaj arboj ĉirkaŭ bela lago en la apudrivera urbo Hamilton, proksime al la geoterma regiono de Nord-Insulo, okazas la 58a Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso ĉe la Universitato de Waikato. La 6an de januaro, post la solena malfermo, kiun kondukas Profesoro Gilsu de UEA, la kongresanoj krozas per ŝalupo sur Rivero Waikato. La sekvantan tagon oni ekskursas al Rotorua kaj la geotermaj mirindaĵoj ĉe loko nomata "Pordego de Infero", kaj al Lago Tarawera por spekti la "Enterigita Vilaĝo" kiu kovriĝis per kvar metroj da koto pro la erupto de Monto Tarawera dum la nokto de 10 junio 1886. La du sesioj de la Jarkunsido okazas en la 8a kaj 9a de januaro, kaj tuj post la elektado de la nova Estraro, ĉiu vizitos la ĝardenon de Elton Scarrow. Li estas fama konsilisto pri ĝardenado per televido.

Tri vizitantoj el Koreo, unu el Japanio, kaj unu el Nederlando pleningas la etoson de nia propra Esperantio. La 10an de januaro, post diservo, paroladoj, formala debato ktp, la kongreso bankedas ĉe sia propra manĝejo ĉe la kongresejo.

QLD: Antaŭ kelkaj monatoj venis peto por helpo; temis pri vestoj por infano en Rostov-Don, al kiu anoj de la Brisbana Societo tuj respondis. Du paketoj baldaŭ estis survoje al Rusio. Alvenis dankletero kun foto de la infano, patrino kaj avino. Konferenco de

la Federacio okazis en Clontarf, la 10-11an de oktobro. Dudek anoj el Brisbano, Toowoomba, St Lucia, kaj Sunbrila Marbordo partoprenis, kaj vizitis la konferencon kelkaj anoj de la antaŭa, nun neaktiva grupo de Redcliffe. Elstara parto de la konferenco okazis kiam en la ombro de majestaj arboj en pitoreska parko Trevor Steele laŭlegis rakonton el *Memori kaj Forgesi*, kaj poste parolis pri la vivado en Rusio kaj Pollando.

Al la distraĵvespero kontribuis Brisbana Kantgrupo; Annie Spencer per propraj poemoj; David Gould, anekdotoj; dramlegado, Gaye Phillips/Kay Andersen; Ray/Peggy Ross; Peter Keates montris fotojn kaj parolis pri dumonata vizito al Eŭropo.

Brisbano: La Societo ricevis inviton partopreni en Fiesta '92, dimanĉon la 8an de novembro ĉe Parko Musgrave. Tom O'Grady kaj Ray Ross kunportis kaj starigis la standon; Trevor Steele kaj lia filo David prizorgis la budon dum la lunĉoro. "Ne surprizis nin, ke anoj de diversaj etnaj grupoj jam aŭdis pri Esperanto, dum niaj samlandanoj ofte ne!" Estis plezuro renkonti kaj paroli kun pli ol ducent informpetantoj pri diversaj aspektoj de la vivo mem, kaj pri la neceso posedi "duan lingvon por ĉiuj".

TAS: Zamenhofa Festo okazis la 14-an de decembro 1992 en la Kvakerejo. Venis multaj esperantistoj. Estis tre bone vidi tiujn, kiujn ni preskaŭ neniam vidas dum la jaro. Venis eĉ la

Stratalbina Grupo, kiu i.a. prezentis skeĉon pri sorĉistino. Kolino kaj Dan prezentis alian amuzan skeĉon. Poemojn deklamis Margareta kaj Indrani. Pat deklamis la faman poemon "Postsignoj en la sabro". Kelkaj paroladis kaj ĉiuj ĝojis.

WA: La 15an de decembro la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio okazigis sian Zamenhof-feston en la Universitata Domo de la Universitato de Okcidenta Aŭstralio. Parto-

prenis kvindek da personoj. Festparoladon faris Shirley Landquist, de la Aŭstralia Asocio por Unuiĝintaj Nacioj. Ni ankaŭ ĝuis muzikan trion (piano kaj du violonoj) kiu mem valoris la prezon de eniro! Eĉ via redaktoro (DB) sukcesis ĉeesti. Kvan-kam lia vagono, tirata de tri testudoj, kutime ne sukcesas navigi la 80-mont-kilometran vojon de Bakers Hill al Perto, helpis instigi la tirbestojn lia edzino Norma. ▣

RAPORTO PRI RADIO 3ZZZ 1992 DE SVETISLAV KANAĈKI

Jen ankoraŭ unu jaro pasis dum Esperanto disaŭdigas sian programon. Mi povas kun fiero diri ke eĉ ne unu lundo pasis sen nia regula programo.

Por fari regule bonan programon necesas tempo por legado de diversaj esperantajoj, selekti kion meti en la programon, selekti muzikon por ke ĝi estu varieca, kun eroj intermiksitaĵoj por ne esti tro tedaj kaj longaj. Nia radiotempo estas mallonga kaj ne estas facile aranĝi tuton, sed mi faras mian plejbonon ĝis nun.

Feliĉe nun ni havas bonegan helpon. Vi jam ĉiuj konas S-inon Jenny Bishop, plurfoje oni en Melburno povis aŭdi ŝin pere de radio-ondoj. Mi estas tre kontenta ke Jenny akceptis mian proponon aktiviĝi en radio-disaŭdigo de la esperanta lingvo. En la lastaj kelkaj semajnoj mi trejniĝis Jennyn kaj ŝi nun estas preta anstataŭi min.

De nun vi aŭdos Jennyn regule, mi nur estos preta helpi ŝin en kriz-okazoj, kiaj povas okazi rilate ĉiujn eĉ plej spertajn anoncistojn. Mi preparos kun helpo de vi ĉiuj; mi elkore dankas al vi ĉiuj pro via subteno morala kaj financa—membrecio kaj donacoj ĉu por *Radiothon* ĉu por aliaj niaj elspezoj kiuj de tempo al tempo okazis.

Ĉijare ni havis 52 regulajn dissendojn po 30 minutoj, do sume 26 horojn. Entute iom pli ol 40 esperantistoj kaj Esperanto-grupoj kontribuis al la enhavo de la programoj

Kion ni prezentis:

Esperantaj novaĵoj angle	20-foje
Esperantaj novaĵoj esperante	15-foje
Lecionoj <i>Bonan Tagon</i> po 5 min.....	12
Lecionoj <i>Jen Nia Mondo</i> po 7 min...	24
Esperanto-kantoj.....	205
Dum entute 3½jaroj ni prezentis 192 programojn.	▣

Respondoj por la Citajkvizo

1h, 2ĉ, 3f, 4ĝ, 5g, 6a, 7d, 8i, 9j, 10b, 11c, 12e, 13j, 14h



Commerce: An Esperanto bulletin *Monda Merkato* (World Market) is now being published in Germany, for the purpose of facilitating the international sale of products, particularly between the Western developed countries and Eastern Europe. It has been adopted as an official publication of the Esperantist *Internacia Komercista kaj Ekonomika Fakgrupo* (International Commercial and Economic Specialist Group) founded 1985. Another Esperanto journal, *Ekonomia Bulteno pri Usono* (American Economic Bulletin), provides monthly reports on the American market.

Music: In honour of the 75th anniversary of composer Lou Harrison, the Oakland (California) Symphony Chorus presented a concert which culminated with his *Koro-Sutro* (Heart Sutra) sung in Esperanto. Composed for chorus and American gamelan, the Sutro is based on Buddhist sacred texts. It was first performed in 1972.

New Opera: The Hungarian and Austrian Esperanto Associations are collaborating on the development and presentation of a new opera based on the work by Imre Madách *Tragedio de l'Homo* ("Tragedy of Man"). It is intended to premiere simultaneously in Budapest and Vienna on the occasion of EXPO '96 in Hungary.

Film: This year is the 30th anniversary of the first feature film in Esperanto. Made in 1963 and first presented late in 1964, *Angoroj*, a one hour crime thriller, is now available on video. It was produced and directed in France by Jacques Louis Mahé. The video is available at 45 Swiss francs from Kooperativo de Literatura Foiro, CP 303, 1008 Prilly, Switzerland.

Puppets: July 31—August 5 1992 The First Klagenfurt [Austria] Festival of Puppet Theatre was host to fifteen puppet theatre companies, of which five presented their plays in Esperanto. The three groups Ateneum from Katowice (Poland), La Clarté from Osaka (Japan), and the troupe from Galați Romania were awarded prizes by the Language Jury.

The First World Congress of Handicapped Esperantists was held July 18-25, 1992, in Františkovy Lázně, Czechoslovakia, organized by the Czechoslovakian Association of Handicapped Esperantists.

The children's magazine *Koncize* reached its 100th edition mid last year. It is published by the Germana Esperanto-Junularo (German Esperanto Youth) for a consortium of Esperanto youth organizations in Austria, Britain, Belgium, Finland, France, Germany, Hungary, Italy, Netherlands, Switzerland, and others. ✉ GEJ, Rheinweg 15, D-W-5300 Bonn 1, Germany.

SUMMER ESPERANTO WORKSHOP

June 28 - July 16, 1993

San Francisco State University

Three intensive weeks • Three semester units • Full university credit.

The Esperanto League for North America is sponsoring the San Francisco State University's 24th Annual Summer Esperanto Workshop. Five courses are available.

ESP 594 Beginning Esperanto (3 units): Welcome to Esperanto. Specific training in standard spoken and written Esperanto for students completely new to the language. The long-term goals and current uses of Esperanto for travel and education will be discussed.

ESP 595 Intermediate Esperanto I (3 units): Gaining Confidence in Esperanto. For those who have made an initial study of Esperanto, this course, conducted in Esperanto, includes a systematic review of structure and vocabulary, and stresses conversational ability.

ESP 596 Intermediate Esperanto II (3 units): Esperanto in practice, language & literature. Students with a good basic understanding of and capability in the language will, through discussions based on readings, explore the realms of travel and culture, with special reference to literature and traditions.

ESP 597 Advanced Esperanto (3 units): Esperanto language, movement and culture, a historical survey. This course, conducted entirely in Esperanto, will provide an overview of the highly complex history of the movement and the language community.

ESP 699 Independent Studies (3 units): Directed studies in Esperanto. Participation is limited to students who have already studied intermediate or advanced Esperanto at SFSU and is subject to the approval of the instructors.

The instructors will be: David K. Jordan (Professor of Anthropology, University of California, San Diego); Mark Fettes (former editor, *Esperanto* magazine); and Boris Kolker (Translator for Oil Well/Logging Institute in Ufa, Russia. Member of the Academy of Esperanto.)

Course fees: Approximately US\$321. **Housing,** 3 weeks, 3 meals daily: US\$640 double, US\$780 single. Some partial financial support for needy students in the program is available.

For details, application forms, etc. contact Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough CA 94010, USA.

Students from Australia and New Zealand who have undertaken these intensive courses in the past give glowing reports.

Our Correspondence Courses

by John Moore

3. Translation Course—"The Esperanto Teacher"

Course Three, based on Mason Stuttard's book *The Esperanto Teacher* differs from the first two in that it is all in writing. The student, having mastered the spelling and pronunciation of Esperanto by working through *Bonan Tagon* and *Jen Nia Mondo*, is now ready for this as a preliminary to letter writing. It is also an ideal "refresher" for "rusty" Esperantists—(and those already possessing the Wells dictionary get a rebate).

Each of its twenty lessons treats thoroughly one or two grammatical points, comparing English grammar with that of Esperanto, with many examples—each lesson gives a set of exercises illustrating the points dealt with, for the student to practise while they are still fresh in the mind. Further good practice can be gained by then translating the English "key" (sample translation) at the back of the book, back into Esperanto and comparing the result with the original.

Because translation is an individual thing, it is possible to differ from the book's version and still be right. This is where the tutor comes in. The student can—and should—refer such differences to the tutor for a ruling and/or explanation. Again it is emphasized that this sort of two-way communication is one of the great advantages of learning by mail.

As with previous courses, there is after each lesson a separate set of exercises to be worked and sent to the tutor along with the student's questions.

The final such exercise is at the level of the *Elementa* examination of the AEA—it is in fact based on questions previously set in this examination. Students who do well at this—and most do—are assured that they would have a good chance of succeeding, if they then wish to apply, in the examination itself.

However, it is not necessary to sit for an examination before going on to our next course, the *Progressive* for which this Course 3 has been an excellent preparation.

John Moore is Director of Correspondence Courses for the Australian Esperanto Association. He can be contacted at 7 Pelican Street, Emu Park Qld 4702.

AEA PARTICIPATION IN THE LANGUAGE EXHIBITION 4-7 NOVEMBER 1992, MELBOURNE

Reported by Erroll Chick

The Language Exhibition was well organized by the National Languages Institute of Australia, funded by the Federal Government to implement its Languages and Literacy Policy. Of importance to Esperantists, its Charter includes: "A language other than English for all".

Facilities, activities and location were excellent. The AEA's decision to hire a normal sized stand was correct, but its area, 3x3m², was too restrictive.

The Esperanto display as presented by Ruth and Gerald Tumman was exceptionally good and, considering our financial constraints, compared most favourably with the other promotions. Some of the exhibitors and displays were alien to language generally.

Our dominant display was a map of the world showing by dots the distribution of Esperantists in cities and towns throughout the world with an adjoining list of the number of those in each country. The history of Esperanto and a photo of our founder were also shown, as were most of all of our important publications. A separate display case featured *the Holy Bible, The Koran, Hamlet, Peer Gynt* and our own *Australian Anthology*—all published in Esperanto.

The first day was used for exhibitors' preparation, a press conference and the opening ceremony, so the days available to the public were Thursday, Friday and Saturday (Nov. 5-7).

Many school children and a few adults circulated around the stands on Thursday and Friday. On Saturday a few school children and relatively more adults attended, but not as many as expected, probably due to public apathy.

About 600 copies of *Presenting Esperanto* published by the AEA for the occasion were distributed, together with a leaflet contributed by the Melbourne Esperanto Society. The leaflet stressed the importance of communication, a brief explanation of the Esperanto language, and also how and where Esperanto can be studied.

The press conference was attended by a Government Education representative, as well as Max Wearing (one of the two vice-presidents of AEA), Svetislav Kanachki and Jenny Bishop (Esperanto presenters on Radio 3ZZZ), and by Ruth and Gerald Tuman.

Of the seminars two were most important to us: The first was a talk by Dr Peter Ellyard on the subject "Towards a planetary culture: the issue of language", in which emphasis was on the value of Esperanto for the future, particularly as the most easily learned second language. Leading questions were asked by Justice Kep Enderby (President of AEA) and Max Wearing, as well as other Esperantists present.

The subject of the second seminar was "A language other than English for all". Five different speakers were involved, basically promoting French and to a lesser extent German. Questions promoting Esperanto were asked by Justice Kep Enderby, Max Wearing, and Svetislav Kanachki.

At any future Language Expo seminars it would be desirable to have a competent Esperantist present to promote the use of Esperanto, whether Esperantists otherwise participate or not.

It was stated at the Expo that it was considered very successful and another one would be held in Sydney from the 20-24 July, 1994.

Whether the Expo was successful for Esperanto depends on the criteria used. No opportunity was lost to promote Esperanto to the National Language Institute both by talking and literature. If they logically promote Esperanto as the obvious and easiest language to learn other than English, and if that is accepted by the Government, then the money was wisely spent. As many more people, especially children, now know about Esperanto and have a book and leaflet to refer to, many Esperantists will think the cost worthwhile.

However, my criterion for the progress of Esperanto is that we must have learners of Esperanto, particularly younger people, and I have not yet had anyone who attended the Expo inquire about learning it. But my hope is that the Government will support the introduction of Esperanto into our schools.